

“Plena vortaro” pri informadiko

Jam dum kelkaj jaroj mi sekvas la literaturon en Esperanto pri informadiko, estante ankaŭ informadikisto (lic. pri matematiko kaj informadiko). Ŝajnas al mi, ke la literaturo estas nun sufiĉe riĉa por kompili ĝisdatan terminaron pri la fako. Mi scias, ke ekzistas la kvinlingva vortaro el 1972, sed mi pensas pri alia prezento. Jen kelkaj principoj:

— la vortaro listigu terminojn, sed ne normigu; ĝi jes indiku, kiu, kiam kaj kie uzis koncernan terminon;

— la vortaro ne nur enhavu la terminon, sed aldonu priskribon;

— la terminoj kaj la priskriboj estu en Esperanto. Se oni poste decidus aldoni tradukojn en aliaj lingvoj (nur de la terminoj mem), tiuj troviĝu en apartaj ĉapitroj aŭ eĉ apartaj broŝuroj, uzeblaj sendepende de la terminaro;

— la terminaro estu kiel eble plej kompleta: mi volas trastudi kiom eble la plenan literaturon jam aperintan pri la fako;

Mi konscias, ke, eĉ se mi sukcesos tutsule kompili tian vortaron, la rezulto estos multe pli bona, se kiom eble plej multaj homoj kunlaboros super ĝi. Tiom pli, ĉar mi ne volas en la vortaro altrudi kiun ajn opinionon, sed listigi la preferojn de ĉiuj, unu apud la alia egalnivele.

Bonvolu skribi al mi:

— kion vi opinias pri la ideo?

— kion vi opinias pri la menciitaj principoj?

— ĉu vi volas aŭ povas kunhelpi:

— sendante al mi artikolojn, verkojn, tekstojn pri informadiko? Prunte: mi resendos ĉion post nura semajno. Prefere unue sendu liston de tio, kion vi povos disponigi al mi;

— sendante part-terminaron, sen aŭ kun klarigoj de la terminoj?

— trastudante poste la provojn de la terminaro, cele al plibonigo antaŭaperiga?

— alimaniere?

— kiu instanco, laŭ vi, povos eldoni tian vortaron?

Mi esperas, ke vi komprenas la valoron de tia “Plena Vortaro” pri Informadiko por i.a. DLT-sistemo, la ĝenerala faka literaturo, informado pri Esperanto k.t.p.

Tial mi petas sendi al mi viajn opiniojn kaj proponojn ĉi-rilate. Por tio mi dankegas vin jam nun.

Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, B-3030 LEUVEN-Heverlee, Belgio. Tel. 016/20.14.53.

Momĉilo Ŝaponjić (1920-1983)

Kvankam la sanstato de prof. Ŝaponjić dum la lastaj jaroj estis malbona, li neniam forlasadis laboron. Pro tio nin ĉiujn surprizis kaj malĝojigis lia subita forpaso, la 22-an de oktobro 1983.

Li naskiĝis la 9-an de junio 1920 kaj la mezlernejon li finis ĝustatempe, sed la okupacio ĉesigis lian studadon de elektroteĥniko, do li povis fini la studojn nur en 1948. Dum iom pli ol tri jaroj li laboris en fabrikoj; la universitata instruado allogadis lin kaj li fariĝis asistanto (kaj poste dōcento), precipe por la desegna geometrio, en la universitato de *Novisad*. Ekde 1963 ĝis la emeritiĝo en 1981 — pro la kormalsano pli frue ol laŭlege — li estis eksterordinara profesoro. Pro neniam sufiĉa universitata instruistaro, li instruis ankaŭ aliajn similajn disciplinojn, ne sole al la regulaj, sed ankaŭ al postdiplo-maj studentoj. Per tia multflanka kaj sindona laboro li multe kontribuis al la kreado de teĥnikaj fakuloj, sed pro tio (kaj pro poresperanta laboro) li povis dediĉi malmultan tempon al scienca verkado.

Kun Esperanto li renkontiĝis jam kiel gimnaziano, en kontakto kun la tiam Akademia Klubo en *Zagreb* (kies animo estis la posta prof. *Ivo Lapenna*). Al Esperanto Ŝaponjić dediĉis almenaŭ duonon de sia libera aktivado. Li estas inter la unuaj restarigintoj de Jugoslavia Esperanto-Ligo en 1946. Poste li fariĝis la unua sekretario de la fondita Serbia Esperanto-Ligo kaj fervora renoviganto de la Esperanto-vivo en *Beograd*. Dum multaj kursoj li kreadis novajn esperantistojn kaj samtempe li senĉese pliperfektigadis la propran lingvokonon, tiel ke li apartenis al plej bonaj konantoj de Esperanto en Jugoslavio.

Preskaŭ konstante li estis prezidanto aŭ estrarano de Esperanto-societo, dum dudek jaroj prezidanto de Serbia Esperanto-Ligo, samlonge direktoro de Esperanto-Instituto en Serbio, ofte komitatano de JEL aŭ/kaj de UEA. Li estis aktiva ankaŭ en ISAE: dum pluraj jaroj estrarano kaj unu el ĝiaj unuaj dumvivaj membroj. Aperado de SCIENCA REVUO kaj BULTENO DE ISAE en Jugoslavio (dum 16 jaroj) estus neebla sen lia lingva kontrolo (kiun malavare utiligadis ankaŭ aliaj eldonaĵoj en nia lando).

B. Popović